# I N F O R M I L O

*Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)*

***4-2025 (141) oktobro ĝis decembro***

***Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka***

***Blaža Polića 2  51000 RIJEKA  Hrvatska-Kroatio***

Tel.++385(0)(51)334-670 lunde  de la 18a ĝis la 20a horo

Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com

IBAN: HR75 2402 0061 1002 1273 9,

**Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986**

**Redaktoro: D-ro. Ana Alebić-Juretić, dipl.inĵ.  tel.: 091 563 1634**


Rijeka, la 20-an de marto 2026.

Estimataj gesamideanoj,

la fino de la jaro pasis iom trankvile. Kiam la numero de *Informilo* estis preta por eldono, forpasis nia longjara membro ***Adela Franelić***. Ni devas memori ŝian laboron en Esparanto-societo. Krome, en tiu ĉi numero oni priskribas aktivecon en la lasta kvarono de 2025: la prelegon ĉe la Universitato de la Tria Aĝo kaj la jaran kunvenon. Finfine, la poetino Nirvana Beltrame Ferleta estas prezentita,

## ADELA FRANELIĆ



(28.5.1931.-02.2.2026)

Esperanto-societo Rijeka perdis sian tre bonan kaj fidelan membron, ***Adela Franelić***. Pro la postmilita situacio ŝi forlasis la lernejon estante 17-jara, kaj ricevis laboron en *Jugolinio,* kie ŝi laboris ĝis sia emeritiĝo. Ŝi prizorgis pri financan kontadon kaj poste faris ŝipokontrevidanton. Per sia dungo ŝi ebliĝis plie studi al la pli junaj gefratoj. kaj paralele finis la mezlernejon. Ŝi esperantigis en 1988, daŭrigante la vojon de siaj filinoj. Ŝi ŝatis volontuli kaj estis aktiva ĉe la Ruĝa Kruco. Ĉiuj memoras ŝin kiel bona kaj pacema persono, ĉiam helpopreta. Ni memoros ŝin pro ŝia longjara agado en la Societo, ĝis la lasta jarkunveno en 2024.

(A.A-J)

## PRELEGO PRI ESPERNTO ĈE LA UNIVERSITATO POR LA TRIA AĜO

Jam dek kvin jaroj ĉe la Universitato de Rijeka estas aktiva Universitato de la Tria Aĝo (Sveučilište za treću dob-S3D), kiu ofertas laborejojn pri diversaj temoj, prelegojn kaj ekskursojn por homoj pli ol 55 jaraj. Tiel, la 8-an de oktobro 2025, d-ro Ana Alebić-Juretić prelegis pri Esperanto. En tiu prelego ŝi priskribis la historion de Esperanto kaj speciale en nia urbo Rijeka, parolis pri la 16 netuŝeblaj reguloj de Zamenhof, kiuj ebligas rapidan kaj facilan lernadon de ĝi, la statuso de Esperanto nun kaj siaj spertoj kun Esperanto. Kvankam oni konsideras Esperanton la




*Anonco pri la prelego de D-ro Ana Alebić-Juretić ĉe la Universitato de Tria Aĝo  (Uzo permesita da S3D mem)*

unua internacija planita lingvo, en Rijeka tio ne estas vera. En Rijeka la unua internacia lingvo por komerco kaj navigado en Mediteraneo estis la fiuma dialekto ekde la mezepoko kaj la unua planita internacia lingvo estis Volapuko, kies klubo estis fondita jam en 1887, la unua kaj la sola en nuna Kroatio. La sekvan jaron estis eldonita en Rijeka (kun Trieste) la unua lernolibro pri ĝi: *Assio Cattilio: Corso pratico veloce di Volapük, Trieste-Fiume, 1888*. Kun la apero de Esperanto, la intereso je Volapuko malaperis, kaj en 1907 estis fondita la unua Esperanto-klubo en Rijeka kaj nuna Kroatio: *Fiumana Esperanto grupo* (Grupo Esperantista fiumano), kiu estis la ununura parto de la planita  Adriatika Esperanto Ligo.

Ĉirkaŭ dudek personoj partoprenis en la prelego, kaj oni esperas ke iu el ili decidos lerni ĝin.

## NIRVANA BELTRAME FERLETTA

***Nirvana Beltrame Ferlet**ta* estas la fiuma verkistino. Ŝi naskiĝis en Rijeka en 1952, finis la italan mezlernejon kaj verkis por la itala tagĵurnalo La Voce del Popolo . Ŝi eldonis la libron *Iu ajn mateno* (Una mattina qualsiasi) en kiu ŝi priskribis la vivon en sia urbo Rijeka -eksa Fiume, kiu perdis sian italan aspekton. Ŝi ankaŭ verkis poemojnen la fiuma dialekto, kaj ricevis plurajn premiojn de la literatura kurso *Istria nobilissima* kaj similaj konkursoj en Trieste, Peruggia, Muggia kaj Venecia.

Ŝi esparantigis en 2019 kaj partoprenis en la programoj de Esperanto klubo Rijeka.

### Un quartier

Un quartier
al quinto pian
Tanti fiori sul pergolo
el più bel de tuti i vicini.
Ogni giorno, verso le due,
me sentavo sula sedia a dondolo
Tornava i cantierini.
La vedevo vegnir pian in su,
le mani tirade dale borse dela spesa
la faceva più picola.
Anche de lontan la era
molto bela e mi ne ero fiera.
Quando sentivo el campanelo
ge corevo incontro e
ghe disevo tante robe.
No sapevo, mama quanto ti eri stanca
Adeso so.



*Prezidanto Emil Hrvatin, Ana Radulović kaj Nirvana Beltrame Ferletta dum la jarkunveno*

### Unu loĝejo

Unu loĝejo
je la kvina etaĵo.
Multaj floroj sur la teraso
la plej belaj el ĉiuj najbaraj
Ĉiu tago, je la dua
mi sidiĝis sur la balancseĝo.
Revenadis la ŝipkonstruistoj
Mi vidis ŝin veni malrapide supren
la manoj ŝarĝitaj per aĉetsakoj
faris ŝin pli malgranda
Eĉ de malproksime ŝi estis
tre bela kaj mi estis fiera pri tio.
Kiam mi aŭdis la sonorilon
mi kuris al ŝi renkonte
kaj diris multajn aferojn.
Mi ne sciis tiam, panjo, kiom vi estis laca
Nun mi scias.

(Skribis: A. Alebić-Juretić)

## JARKUNVENO KAJ ZAMENHOFA TAGO

La jarkunveno por la jaro 2024 okazis sabate, la 14-an de decembro 2025. Dek membroj partoprenis en la kunveno kaj la eksa librotenistino Lovorka Batistić kiel gasto. Ŝi helpis pri klarigo de la financa raporto. Ana Alebić-Juretić havis rimarkojn kaj kompletgis raporton pri laboro por 2024 kaj manko de kotizmono por partopreni en kunvenoj en la financa plano por 2026. Partopreno al esperantaj kunvenoj estas tre grava por esperantistoj. Damir Morankić raportis ke la karnavala grupo ne estis ankoraŭ formita, sed ili planis partopreni en iuj karnavalaj eventoj.
Post la kunveno oni festis la Zamenhofan tagon

*(A.A-J.)*

***Lektoro: Elda Dörfler***